Kortaj p-j. el larĝaj bekoj, *gansoj*; specoj, cindrogriza aŭ sovaĝa, rikolta, kampa, etbeka, blankafrunta, malgranda, hiperboreala aŭ *neĝoganso*, cigna. la genro de gansoj, *bernaĥlo*; specoj *rufĥolganso*, *monaĥinganso*, *nilganso* aŭ *vulpoganso* (el Egiptujo, spronflugila), *kanadganso*.

P-j. longakolaj kaj lamembekaj, *cignoj*; specoj, *ĥantocigno* (nigre-flavbeka), *mutcigno* (ruĝabeka), malgranda, trumpetanta, nigrakola, nigra (tre malofta), nevariebla.

P-j. kun la bekoj pli larĝaj ĉe la ekstremo ol ĉe la bazo, *anasoidoj*. Genroj de anasoidoj, *anaso* (specoj, sovaĝa, hejmebla, diversgriza, pintovosta aŭ akravosta); *fazananaso* (ĝi estas granda); *fajfanaso* (specoj, eŭropa kaj amerika), *platbeĥo* aŭ *rinkapso* aŭ *platbekanaso* (el tropika Ameriko), *gansanaso* aŭ *tadorno* (specoj, marborda kaj rusta aŭ nesal-akva), *ĥrekanaso* aŭ *ĥerĥedolo* (specoj, blufugila, malgranda, mallarĝ- beka aŭ marmora), *mantelanasego*, *ĥlukanaso*, *belanaso* (ia speco, la karolina), *fuligulo* (*fuligolo*, laŭ Verax) aŭ *merganaso* (specoj, ruf- kapa, rufohupa, nukhupa, blankokula, mara); *ĥlangulo* (*ĥlangolo*, laŭ Verax; ĝi estas migranta p.); specoj, orokula, islanda kaj amerika); *arktanaso* (longvosta); *arlekanaso* (migranta); *nigranaso* aŭ *ojdemio* (specoj; tuberbeka, oranĝbeka, okulringa); *molanaso* aŭ *ejdero* aŭ *somaterio* (specoj, eŭropa, grizkapa, siberia); *blankĥapanaso* (el mal- nova kontinento).

Riverbordaj p.-j. el glaciaj landoj, similaj al anaso, *mergoj* (specoj, malgranda, hupa, granda aŭ *gansomergo*, longbeka).

Gansoidoj, cignoidoj kaj anasoidoj (pro sia dika beko, kies bordo havas denthavajn lametetojn) formas grupon, kiu estas nomata *lam-elirostroj*.

Aliaj p.-j., *aptenodito* aŭ *brakiptero* (el glaciaj maroj, kaj naĝas sub la akvo ĉar siaj flugiloj taŭgas kiel naĝiloj), *herdeĝolo* (marĉa), *krizőkomo* (norda aptenodito).

**Longkrurbirdoj** (aŭ *stilzbirdoj*, ĉar siaj senplumaj kruroj similas stilzojn).—L. kun dika forta pinta beko, tranĉanta ĉe la ekstremo, *cikoniooidoj*. Cikoniooidoj kun mallonga beko kaj malgranda kapo, *gruoj*. Genroj de gruoj, *gruo* (specoj, cindrogriza, blanka aŭ rusazia, dancanta aŭ numidia), *pagruo* aŭ *baleariko*, *agramio* (sud-amerika). Cikoniooido kun longa kolo kaj tufo el plumoj post la nuko, *ardeo*. Genroj de ardeoj, *herono* (specoj, cindrogriza, nigrokapa, vila, egipta aŭ ibisa), *bovbirdo* aŭ *butoro* aŭ *botaŭro* (rimarkinda pro sia tre alta bleko; specoj stelmakulita aŭ granda, malgranda kaj amerika), *noktoherono* (kvakanta), *egreto* (ĉasata pro la beleco de siaj blankaj plumoj; specoj, granda kaj malgranda); *spatolo* aŭ *spatulo*; *tantalo*; *bovgardulo* (malgranda). Cikoniooido granda kies fingroj estas kunigitaj per membranoj, *cikonio* (specoj, blanka, nigra). Cikoniooido kun senhara kapo, el Afriko kaj Hindujo, *leptopilo*. Iaj cikoniooidoj neeŭropaj, *mikterio*, *plataleo*, *skopo*, *anastomo*.

L. kun longaj maldikaj bekoj, *longirostroj*. Ia akva l. el la tropikaj landoj, *paro*, L.-j. el Sud-Ameriko, *ĥamiĉo*, *palamedeo*, *ĥaŭralo* (el tropika Ameriko). Ia l. tre simila al cikonio, *dromo*.

L. kun tre longaj kolo kaj kruroj, *fenikopteroj*. Genroj de fenikopteroj, *spatelbeĝo* (blanka), *flamanto* aŭ *flamingo* aŭ *flamingo* (ia speco la *flambirdo*, havas lamembekon kaj rozkolorajn kaj ruĝajn plumojn).

L. kun maldikaj longaj kruroj kaj malforta maldika beko, *ibiso* (specoj, religia, brunbrila aŭ *ĥurlibiso* aŭ *falĉilbeĝo*).

L. kun dika kapo, cilindra beko kaj mallonga kolo, *pluviooido*. Genroj de pluviooidoj, *ŝtonĥurlo* (kun grandaj okuloj, vivanta en Eŭropo); *taĥidromo* (sablobruna kaj kurema); *hirundopluvio* aŭ *glareolo* (specoj, mara, stepa, herbeja); *pluviano* (kiu persekutas krokodilojn); *ĥibito* aŭ *vanelo* (specoj, apudakva aŭ hupa, sociema aŭ stepazia, blankvosta, spronarmita); *ĥaradrio* (specoj, griza, konfidanta aŭ *mornelo*, koluma, rivera, marborda, stepa aŭ kaspia, dikbeka; la kvin lastaj estas malgrandaj); *tringo* (platbeka, malgranda, blankvosta, mara, granda aŭ *ĥanuto*, alpa aŭ nigrakropa); *sablotringo* aŭ *ĥalidro*

(ĝi vivas en marĉoj aŭ en marbordoj; specoj, *sanderlingo* de Anglujo kaj Nederlando, kaj boreala); *strepselo* aŭ *turniŝtono* (boreala, vivanta en marĉoj kaj simila al karadrio); *beĥaso* aŭ *ŝkolopo* (kun la okuloj posten, kaj la supera mandiblo pli longa ol la malsupera; specoj, marĉa aŭ *galsĥolopo* aŭ *galinago*, malgranda, arba aŭ *rustikolo*, granda aŭ *dublo* ankaŭ vivanta en marĉoj); *falaropo* (specoj, hiperboreala, platbeka); *ĥurlo* (specoj, stepa kaj granda, marĉa aŭ mezgranda aŭ *feopo*, eskima aŭ malgranda, mezmara, marborda aŭ *numenio*, *marpigo* aŭ *hematopo*, *avoceto*, *ĥruregio* aŭ *himanтропо*; la tri lastaj estas el malnova kontinento).

L. kun mallonga forta beko, longaj fingroj kaj dika korpo, simila lanta kokonon, *galinoido*. Genroj de galinoidoj, *akĥokoketo* (specoj, makulita, olivbruna aŭ malgranda, nana), *ĥreĥo* (herbaja), *galinulo* (*galinolo*, laŭ Verax) aŭ *akĥokoko* (ĝi estas verdkrura); *sultanĥoko* aŭ *porfirio* (specoj, blua, emeraldadora, nana); *fulĥo* (ĝi vivas apud la marĉoj; specoj, nigra kaj krestohava aŭ nordafrika); *ralo* (eŭropa akvama); *staro* aŭ *otiso* (specoj, granda, malgranda aŭ *tetraĥo*, azia kolumhava, afrika blankahupa), *alektoro* (sovaĝa).

L. vivanta en ŝlimo, *ŝlimbirdo*. Genroj de ŝlimbirdoj, *limozo* (specoj, nigravosta, griza aŭ longkrurā, rusa), *ĥunbatanto* aŭ *duelbirdo* aŭ *maĉeto* (eŭropazia), *marpipio* (specoj, eŭropazia, makulita aŭ amerika), *tereĥio* (rusazia), *akĥokavaliro* aŭ *totano* (simila al ŝkapolo; specoj, verdakrura, arbara aŭ malgranda, olivkrura aŭ granda, ruĝkrura aŭ *gambeto*, longvosta, duonpalmopieda, makulita aŭ *arĥekeno*, *stagnokavaliro*).

Fosilia l. dufoje pli granda ol homo, renkontanta en la aŭstralia pleistoceno, *dinornito* (*dinorniso*, laŭ Verax). Speco de dinornito de Madagaskaro, simila al struto, *epiornito* (*epiorniso*, laŭ Verax).

**Kokbirdoj.** — K. kun senplumaj vangoj, ergoto kaj longa vosto, *fazanoido*. Genroj de fazanoidoj, *fazano* (kun longa belkolora vosto kaj bongusta viando; specoj, kaŭkaza, orkolora, diamanta, diverskolora, nigra blanka aŭ arĝenta, blankakola aŭ el Manĉurio, adorata aŭ reĝa); *ĥoko* (kun ruĝa kresto kaj bongusta viando; la ino metas bongustajn ovojn; la kaŝtrita grasiga koko estas nomata *ĥapono*); *pavo* (kun vosto diverskolora ventumilforme etendebila; specoj, blanka, kortbirda); *numido* aŭ *perloĥoko* aŭ *pintado* (kiel koko, sed kun tufo el plumoj anstataŭ kresto); *gango* aŭ *pteroĥlo* (specoj, nigra ventra, akra vosta, rusazia aŭ trifingra aŭ *stepĥoko*).

K. fazanoidosimila, sed kun pendanta karnaĵo sur la beko, *meleagro* (kun bongusta viando; specoj, *dindo* aŭ *hinda ĥoko*, nordafrika aŭ *trifingrio*).

K. kun malgranda kapo, plumhavaj vangoj kaj mallonga vosto, *tetraoido*. Genroj de tetraoidoj: *neĝperdriko* aŭ *lagofo* (specoj, vintreblanka, skotlanda, arkta, boreala aŭ muta, spicberga, tetrina; la lasta estas hibrido de neĝperdriko kaj tetrino); *tetrao* (specoj, urala, *urogalo*, lrvosta aŭ arbokampa aŭ *tetro*, *urogalintetro*, neeŭropa aŭ *bonasio*, avelarbara, grizventra; la du unuaj estas grandaj; la du lastaj, malgrandaj); *koturno* (el Eŭropo kaj Azio, kun bongusta viando); *perdriko* (griza, kun delikata viando); *rokperdriko* (specoj, sudeŭropa, rufa, *ĉukaro*, berbera aŭ sarda); *frankolino* (*frankoleno*, laŭ Verax; ĝi loĝas sur la arboj); *ortikso* (amerika); *tinamo* (amerika).

la kokbirdo el intertropika Ameriko, *krakso*; el Hindujo, rimarkinda pro sia bela plumaro, *lofoforo*.

**Kolombabirdoj.** — Gentoj: hejma aŭ *kolombo* (ia kurioza speco estas la *kurierkolombo*); sovaĝaj, *palumbo* aŭ *boĉolombo* (arĝentokola), *enaso* aŭ *arboĉolombeto* (kun nigra vosto kaj ruĝa brusto), *livio* aŭ *montokolombo* (blugriza vivanta en rokoj de la marbordoj norvegaj, anglaj kaj sudeŭropaj; el ĝi devenas ĉiuj specoj de hejmaj kolomboj); *lofiro* (hinda).

Malgranda k. kun longa ronda vosto, *turto* (specoj: migranta, eŭropa aŭ *turturo*, kantanta; la lasta el Azio kaj Afriko).

**Rabobirdoj.** — Tiu ordo enhavas precipe tri familiojn: *falkoidoj* (diurnaj), *vulturoidoj* (diurnaj) kaj *strigoidoj* (noktaj).

*Falkoidoj* estas plejkruelaj r.-j., havas kurban bekon, pintajn ungojn kaj longajn flugilojn.

Subfamilio de falkoidoj, kun rondaj flugiloj kaj tarsoj kovritaj per plumoj, *aglo*. Genroj: *aglo* (specoj, orbruna aŭ nordeŭropa aŭ nardazia, nobla, roka aŭ monta, reĝa aŭ blankdorsa, hispana aŭ blankŝultra, strivosta aŭ mezmara, helventra aŭ bota, brunventra aŭ malhela); *stepaglo* (specoj, rusa aŭ ukrania), *kriglo* (specoj, rusa aŭ granda, mezeŭropa aŭ malgranda); *maraglo* aŭ *pigargo* (specoj, blankvosta aŭ granda aŭ malnovkontinenta, nigravosta aŭ longvosta aŭ rusazia, blankakapa aŭ usona); *serpentaglo* aŭ *cirkaeto* (speco, malnovmonda aŭ etfingra aŭ *buzaglo*); *fiŝaglo* aŭ *pandiono* (speco, rivera laga strivosta tutmonda).

Subfamilio de falkoidoj kun longaj flugiloj, longa vosto pli larĝa ĉe la ekstremo ol ĉe la bazo, kaj mallongaj tarsoj, *milvo* (specoj, reĝa aŭ granda, nigra, nigrorela, egipta aŭ parazita aŭ flavbeka, nigraflugila aŭ *elanio*, amerika aŭ *hirundomilvo*).

Subfamilio de falkoidoj kun beko kurbigita ekde la bazo, rondaj flugiloj, longaj tarsoj kaj fingroj, kaj akvaj ungoj, *akcipitro*. Genroj



## INSTITUTO ESPAÑOL DE ESPERANTO

**Tercera lista de diplomas expedidos por el Instituto.** (Véanse los números 13 y 32 de la Revista).

De «*supera kapableco*».—44, D. Luis Santamarina Pedrayo (Orense); 45, D. Feliciano Oliván (Cartagena); 46, D. Hipólito S. Luengo (Orense); 47, D. Manuel Monteagudo (La Coruña); 48, D. Samuel Roca y Rodó (Barcelona); 49, D. Javier Marauri y Mendoza (Madrid).

De «*elementa kapableco*».—227, Srta. Luzdivina Peláez Prado (Gijón); 228, D. Manuel Colinas Núñez (Madrid); 229, D. Manuel Rubio Donoso (Madrid); 230, D. Luis Cardona Prado (Yebra, Guadalajara); 231, D. Luis Santamarina Pedrayo (Orense); 232, D. Arturo Francisco Lorigo (Castropol, Oviedo); 233, D. Hipólito S. Luengo (Orense); 234, D. José Peris (Catarroja, Valencia); 235, D. Gaspar Vilar (Valencia); 236, D. Samuel Roca y Rodó (Barcelona); 237, D. Javier Marauri y Mendoza (Madrid); 238, D. Amado Hernández (Zamora); 239, D. Ricardo Avilés Pellicer (Valencia); 240, Srta. Adela Hoyo García (Chestre, Valencia).

**Renovación de cargos.**—Vacante el puesto de presidente por fallecimiento de D. Mariano Mojado, el vicepresidente D. José Perogordo ofreció este cargo a D. Vicente Inglada, puesto que es *akademiano* y no obstante su baja en el Instituto; pero, habiendo rehusado este samideano aceptar la presidencia, ha sido elegido para ella, en la sesión celebrada el 3 de junio, D. Vicente Alonso (Madrid). En la misma sesión presentó su dimisión el vicepresidente D. José Perogordo, y fué designado para sustituirle D. Luis Rodríguez Escartín. Ambos cargos con carácter provisional.

D. Vicente Alonso ha entregado la adjunta nota para su publicación:

«Nepra neceso devigas min akcepti la prezidantecon de Hispana Esperanto-Instituto. Mi havas la certecon ke tre baldaŭ (post tri-kvar monatoj), mi povos esti anstataŭata de persono havanta plenajn meritojn kaj kapablon por okupi tian gravan postenon. Mi esprimas mian kondolencan pro la morto de la unua Institutprezidanto kaj salutas tutkore frate kaj amike la tutmondajn esperantistojn.—*Vicente Alonso.*»

**Nuevos institutanoj.**—Con arreglo al artículo 3.º del Reglamento, el Instituto tiene a lo sumo cuarenta miembros. Por las razones indicadas en el número 13 de la Revista, se reservan las vacantes ocasionadas por la baja de los señores Maynar, Piñó, Capliure, Luna y Jiménez Mora. Por las mismas razones se reserva tam-

bién la producida por la reciente baja de D. Vicente Inglada. Quedan treinta y cuatro puestos.

Como actualmente hay 21 institutanoj, hay trece vacantes.

De los samideanos indicados en la sesión del 2 de julio de 1934 (número 39 de la Revista) para cubrir las, se hallan en posesión del diploma de *supera kapableco* y, por tanto, en condiciones de ser *institutanoj*: D. Julián Sosa, D. Salvador Oliván, D. Manuel Montegudo, D. Hipólito S. Luengo, D. Javier Marauri y D. Luis Santamarina. Hasta fin de julio actual se recibirán votos de los *institutanoj* a favor o en contra de la admisión de estos nuevos miembros, computándose las abstenciones como votos a favor.

Madrid, 1.º de julio de 1935.—El secretario, *Fernando Redondo*.

---

### MI VOKAS LA JUNULARON DE L' MONDO!

Kiel la mondhelpingvo ESPERANTO, tiel la ideo de l' novtempaj OLIMPIAJ LUDOJ estas destinita kaj kapabla, servi al ĉiuj popoloj de la mondo.

En 1894 la barono Pierre de Coubertin renovigis—en kongreso de la sportpopoloj de l' mondo, kunvokita por tiu celo al la Sorbonne en Paris—la Olimpiajn Ludojn, kiuj dum unu kaj duona jarmiloj estis dormintaj. Por aranĝi la ludojn, oni konservis la klasikan interspacon de kvar jaroj. Sed dum la ludoj en la antikva tempo okazis ĉiam en la sama loko, nome en Olimpio, oni decidis en Paris, ke ili migru, tiel, ke ĉiuj nacioj de l' mondo povu gastigi ilin unu fojon aŭ kelkajn fojojn kaj povu esti entuziasmigataj de ili.

Do la unuaj ludoj ja estis aranĝataj 1896 en Athen, por honori la landon, en kiu la ideo naskiĝis; sed jam la festo de l' dua olimpiado okazis en Paris 1900. Sekvis 1904 St. Louis (Usono), 1908 London kaj 1912 Stockholm. La ludoj de l' sesa olimpiado, por kiuj Berlin jam estis fininta la preparojn, ne okazis. Poste Eŭropo vidis la sepan, la okan kaj la naŭan olimpiadojn; 1920 en Antwerpen, 1924 en Paris kaj 1928 en Amsterdam; kaj nur en 1932 ree la amerika kontinento gastigis la konkursantojn pri la olimpa laŭro, nome en Los Angeles.

De post ilia reveko la Olimpiaj Ludoj ampleksas ne nur la sportojn, kiuj estas praktikataj neprofesie. De 1924 al la someraj ludoj estis aldonataj vintraj ludoj, kiuj okazis 1924 en Chamonix, 1928 en St. Moritz kaj 1934 en Lake Placid. De 1908 kun la sportaj konkursoj estis ligita artkonkurso sur kvin kampoj, kiu elmontras la tutmondan

influan de l' sporta movado al pentrarto, skulptarto, arkitekturo, literaturo kaj muziko.

Kiel lokon de l' 11<sup>a</sup> olimpiado la Internacia Olimpia Komitato destinis la urbon Berlin kaj aprobis Garmisch-Partenkirchen por arango de la Kvaraj Olimpiaj Vintraj Ludoj. Do oni festos la 1-16 de aŭgusto de 1936 la 11-an olimpiadon en Berlin; la 6-16 de februaro 1936 antaŭiras la Olimpiaj Vintraj Ludoj en Garmisch-Partenkirchen.

Laŭ la ĝisnunaj sinanoncoj la germana organiza komitato kalkulas je grandioza partopreno de la tuta mondo. La simbolo de la Berlin-aj ludoj, la sonrilo kun la kurskribo: «Mi vokas la junularon de l' mondo!», sonante prologos la feston antaŭ la elita sportjunularo de 50 nacioj. Ankaŭ ties samlandanoj, eĉ la tuta sportema mondo ĉeestos, por ke la nekempareblaj konkursoj okazu antaŭ la okuloj de la entuziasmitaj sportamantoj kaj por ke la teamoj, stimulataj per alvokoj de siaj amikoj kaj samlandanoj, atingu maksimumajn sukcesojn.

Germanujo per tuta forto kaj je sia propra honoro penadas, fari la feston kiel eble plej sukcesa kaj entuziasmiga. La preparoj estas tiom grandegaj kaj ampleksaj, ke neniu vizitinto iam forgesos siajn travivaĵojn. Ĉiuj fortoj de l' sporto, de l' artoj kaj de l' ŝtato estas mobilizitaj. La tuta germana popolo kore bonvenigos la vizitantojn de la 11<sup>a</sup> olimpiado. Ili rakontos pri germana gastamo, kiam ili estos revenintaj hejmen.

*Organiza Komitato por la XI<sup>a</sup> Olimpiado.*

\* \* \*

Oni petas publikigon de traduko de tiu cirkulero sur la hispana ĵurnalaro kaj sendon de la koncernaj ĵurnaloj po du ekzempleroj al la Organiza Komitato por la XI<sup>a</sup> Olimpiado (Berlin Charlottenburg, Hardenberg strasse, 43, III), kiu afable sendas informojn kaj propagandan materialon, laŭ peto.

Se esperantlingvaj leteroj alvenas grandnombre al Organiza Komitato, estas probable ke Esperanto estu unu el la oficialaj lingvoj de la Olimpiado.

## NEKROLOGO

Ni kondolencas nian estimatan samideanon S-ro Francisko Gorgues pro la morto de lia kara patrino, S-mo Rosa Torredelfot, okazinta la 28-an de majo. Ke ŝi ripozu pace!

Ni dankas la revuon «Boletín de la Cruz Roja Española» pro ĝia kondolenco okaze de la morto de nia samideano pastro Mariano Mojado.

## KONGRESOJ DE ESPERANTO

Dum la ĵus pasinta printempo okazis la jenaj kongresoj de Esperanto: de la 17<sup>a</sup> ĝis la 20<sup>a</sup> de majo la 30<sup>a</sup> skota en Rothesay (la «Madeira insulo» de Skotlando); de la 7<sup>a</sup> ĝis la 11<sup>a</sup> junio la 26<sup>a</sup> brita en Southend-on-sea, la plej proksima marbordurbo al Londono; la 9<sup>a</sup> kaj 10<sup>a</sup> de junio la 8<sup>a</sup> jugoslava en Osifeko; de la 8<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de junio la 24<sup>a</sup> belga en Brugge; kaj de la 9<sup>a</sup> ĝis la 11<sup>a</sup> de junio la 17<sup>a</sup> de la Kataluna Esperanta Federacio en Ripoll (Hispanujo). Ĉiuj estis sukcesoj.

Okaze de la skota kongreso la tieaj samideanoj eldonis belan anoncon angle kun vidaĵa landkarto. Kaj okaze de la kataluna Iberia Esperanto-Servo reeldonis la broŝuron *La Rondo* (esperantista danco (eldonita en 1909, prezo unu peseto aŭ du respondkuponoj), kaj *Ripoll*, bela broŝuro 132-paĝa kataluna kaj esperante verkita kun interesaj informoj de Ripoll kaj ĝia monaĥejo, kaj kun pli ol kvardek ilustraĵoj (prezo du pesetoj aŭ kvar respondkuponoj). Ambaŭ verketoj estas haveblaj ĉe Iberia Esperanto-Servo, strato Provenza, 75, Barcelono.

Dum la nuna somero okazos, krom la XXVII<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Romo: En Arnhem internacia perfektiga kurso (8-13 julio), seminario por Cshe-metodaj instruistoj (15-20 julio), internacia kunveno de esperantistaj instruistoj (25-29 julio) kaj vizitaj de britaj karavanoj al la Esperanta-Domo (3-11 kaj 17-25 aŭgusto). En Krakow, la VII<sup>a</sup> pola kongreso (29-30 junio). En Spala, la XIII<sup>a</sup> Internacia Tendaro de Esperantistaj Skoltoj: ĝi komencos la 11-an de julio kaj oni petas ke ĉiu esperanta societo sendu sur oficiala leterpapiro (kaj ĉiu esperantisto sur ilustrita poŝtkarto) saluton al la partoprenantoj de la Tendaro; adreso de la Organiza Komitato: Lelewala, 9, m. 2, Krakow, Polujo.

---

## ENLANDA KRONIKO

*Ferrol*.—Daŭrigante la laboron komencitan de la nacia profesoro S-ro Ludoviko Cereĵo, nia samideano S-ro Antonio Porta gvidas kurson de Esperanto en la lernejo de tiurba Azilo kun ĉeesto de multaj geinfanoj.

\* \* \*

*Zaragoza*.—La societo «Zaragoza Esperantisto» (strato Candalija, 7, 1<sup>a</sup> etaĝo, 11<sup>a</sup> ĉambro) titoliĝas de nun «Esperanto» (Kultura Klubo), kaj kun ĝi kunfandiĝis diversaj esperantistaj rondoj de Zaragoza,

sumante entute 120 membrojn; ĝi apartenas nek al H. E. A., nek al Hispana Konfederacio.

La urba gazetaro raportas amplekse la starigon de la nova societo, al kiu ni deziras grandan sukceson en la propagando de nia lingvo.

\* \* \*

*Torrelavega (Santander).*—Kun granda sukceso finis la kurso gvidata de tiea samideano S-ro Andrés Herrera, Plejmulto el la lernantoj nun korespondas kun fremduloj kaj interŝanĝas poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj esperantajojn. Oni jam ekpreparas por la postsomero novajn kursojn. Gratulojn al tieaj pioniroj!

## EKSTERLANDA KRONIKO

*XXVII<sup>a</sup> Internacia Kongreso.*—Se vi sendas du respondkuponojn al «Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele, 92. Milano», vi ricevos cent glumarkojn de la XXVII<sup>a</sup> Kongreso.

Radio-stacioj de Italujo dissendas ĉiulunde kaj ĉiuvendrede de la 18<sup>a</sup> horo kaj 30 m. ĝis la 18<sup>a</sup> kaj 40 m. esperante.

La numero april-maja de *L'Esperanto* (gazeto eldonata en Torino, Italio), publikigas la kvaran liston de aliĝintoj al Kongreso, kiuj jam estis en tiu dato 11,047!!

Ĉu estas eble ke vi ne aliĝis ankoraŭ, kara leganto? Kvankam sen rabatprofiton, ne prokrastu plu la aliĝon. Faru tion hodiaŭ mem!

*H. E. A. pone en conocimiento de todos los que asistan al Congreso de Roma, que tiene ya dispuestas las tarjetas para la rebaja de los ferrocarriles españoles, las que remitirá a todos los que la soliciten de esta Asociación.*

\* \* \*

*Hungariujo.*—La hungara ministro de la Edukado S-ro. B. Hóman permesis ke en la mezlernejoj povas gvidi senpagajn Esperanto-kursojn profesoroj de la koncernaj lernejoj (1915-1935, prezidanta dekreto).

\* \* \*

*Rozo D-ro Zamenhof.*—Neŭtrala Centro de Esperanto en Praha sukcesis ĉe la ĉeĥoslovaka rozkulturisto S-ro. Jan Böhm el Blatná, ke li nomu novan plantitan rozon laŭ nomo de nia Majstro.

La rozo «D-ro Zamenhof» estas volviĝanta kreskaĵo kun forta odoro; ĝia koloro estas brile-karmin-ruĝa kaj la fundamento de la florfolioj estas orflava. La vergetoj estas 4-6 metroj longaj kaj posedas

belegajn vaksplaceajn foliarojn. Ĉiuj rozkulturistoj ne forgesu ĝin aĉeti!—(Resumo de noto publikigita de Neŭtrala Centro Esperanto en Praha, Ĉeĥoslovakio).

\* \* \*

*Oficiala Honorigo al la Direktoro de U. E. A.*—Lia Moŝto, Francisko I<sup>a</sup>, la Regenta Princo de Liĥtenŝtejno, ĵus nomis S-ro. Rob. Kreuz, Direktoro de U. E. A., en Genevo, «Princa Komerca Konsilisto», konsiderante liajn meritojn pri la fremdul-trafiko en tiu ĉi princlando. De pluraj jaroj la Direktoro de U. E. A. okupigas pri la turisma propagando de Liĥtenŝtejno pere de Esperanto. Li ankaŭ reprezentis la Registaron kiel Speciala Komisaró en niaj universalaj kaj aliaj kongresoj neesperantistaj. Al lia iniciato estas ŝuldataj la ĝis nun aperintaj 2 serioj de oficialaj poŝtkartoj en Esperanto kaj pluraj prospektoj pri la lando. Pro tio, tiu ĉi gratulinda honorigo estas samtempe rekono por la Esperanto-movado kaj pri la efikeco de Esperanto mem kiel moderna helpilo por la turismo. Ĝi estas krome indikilo, laŭ kiu direkto ni devas orientadi nian praktikan laboron.

---

## BIBLIOGRAFIO

---

*GUIDFOLIOJ KAJ BROŝUROJ.*—La Svisa Alpa Poŝtaro eldonis gvidfolion titolitan «Somero. 1935» kun interesaj informoj kaj belaj bildoj. Oni povas mendi senpagan ekzempleron al Direction Générale des P. T. T. Berne, Svislando.

La urbo Košice (Ĉeĥoslovakujo) eldonis esperantan broŝuron kiel turisma propagando. Ankaŭ senpage havebla ĉe la tiea delegito de U. E. A. S-ro M. J. Friedrich Riaditelstvo ŝtat. Zeleznic II.

\* \* \*

*LIBROJ.*—*Sur sanga tero*, de Julio Baghy (Rottenbiller, u. 66, I, 20, Budapeŝto). La aŭtoro donis romanecan formon al veraj okazintaĵoj, historiaj epizodoj kaj personaj travivaĵoj. Ĝi montras kompletan bildon pri la revolucia periodo rusa en 1918-1920 kaj pri vivo de la militkaptitoj en malproksima oriento. La verko (264-paĝoj, 13 × 18) kostas 4 svisajn frankojn (broŝurite), aŭ 5,50 (tole bindite), kaj se oni mendas kvar ekzemplerojn, la kvina estas ricevota senpage.

---

—Ĉu vi estas fraŭlo, edzo, aŭ vidvo?

—Vidvo.

—De kiam?

—De kiam mortis mia edzino.

— I O E L Ĉ I O —


LUDKARTARA PROBLEMO

Prenu el la ludkartaro la kvar *asojn*, la kvar *valetojn*, la kvar *ĉevalojn* kaj la kvar *reĝojn* kaj penu meti ilin sur kvar linioj tiamaniere ke en la sama linio, kolono aŭ diagonalo ne estu du kartoj de la sama nombro de punktoj (du *asoj* aŭ du *ĉevaloj*) nek de la sama koloro (du *trefoj* aŭ du *pikoj*).

Kiom da solvojn havas tiu-ĉi problemo?

\* \* \*

ORGEN-ENIGMO (sendita de Bruno Reichberg.)



La vortoj signifas: en la vertikaj vicoj — 1, ludon; 2, kantadon; 3, malgrandan beston; 4, urbon en Japanujo; 5, faradon; 6, aprobon; 7, tempomezuro; 8, signon; zigzage en la 3-a kaj 4-a vicoj — nomon de ia fama persono.

\* \* \*

SOLVOJ DE LA ANTAŬA NUMERO

La heredo de la onklo.—La kvar solvoj estas  $256^1 = 16^2 = 4^4 = 2^8 = m^n$ . La nevo estas  $n$ , la disdonota kapitalo  $K = (m + 1)^n$ , kaj

$$\text{la nekonata ono } o = \frac{1}{m + 1}$$

Provo: Unua solvo:  $K = 257 \gg n = 1 \gg o = \frac{1}{257}$ .

$$\text{Dua : } K = 17^2 = 189 \quad \gg \quad n = 2 \quad \gg \quad o = \frac{11}{17}$$

$$\text{Tria : } K = 5^4 = 625 \quad \gg \quad n = 4 \quad \gg \quad o = \frac{1}{5}$$

$$\text{Kvara : } K = 3^8 = 6561 \quad \gg \quad n = 8 \quad \gg \quad o = \frac{1}{3}$$

*Divenaĵo.*—Silikvo.—Siliko.—Silko.

\* \* \*

AVERTO. (Sendita de «Literatura Mondo»).

Ni konstatas, ke kelkaj samideanoj reprecis fragmentojn aŭ artikolojn el niaj eldonaĵoj kaj precipe el la «Enciklopedio de Esperanto», nepetinte antaŭan permeson kaj neindikante la fonton. Ni informas la esperantistaron, ke estonte ni leĝe persekutos ĉiun personon, kiu kaŭzis damaĝon al nia eldonejo per senrajta represio.

\* \* \*

#### KORESPONDANTOJ PER POŝTKARTOJ, ATENTU!

Nova internacia poŝtregulo, kiu valoras de januaro 1935, postulas, ke la poŝtmarkoj, kiuj afrankas poŝtkartojn, devas esti gluitaj *sur flanko de la adreso*. Tiuj, kiuj surhavas poŝtmarkojn bildflanke, estos rigardataj kiel neafrankitaj.

(El *La Interligilo de l' P. T. T.*, de marto 1935).

\* \* \*

ORLEANS (Francujo).—Ernesto Schweingruber, rue des Africains, 11, serĉas agadkampon en mezmara lando por entrepreno pri arbkulturo. Sciigojn per vorto «Karamba».

